



## PILO-PRESS

Internacia  
Informservo

N-ro 24/1973 17 okt 1973  
Aperas ĉiusemajne



Glumarkoj pri la  
59a UK Hamburg 1974  
5 folioj = 3,- GM

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel  
Postfach 2113  
D-85 Nürnberg . 1  
Tel. (09 11) 46 36 49; 5142 69  
Mendu ĉe Libroservo  
L. Pickel, 85 Nürnberg

Gezocht: een wereld taal

Imitinda ekzemplo de informado

Hago (pp) INTERMEDIAR, 88paĝa semajna revuo nederlanda kun la subtitolo "Informado por gvidantaj funkcianoj", en siaj numeroj 36 kaj 37 de vol. 9/1973 publikigis la nederlandlingvan tradukon de la broŝuro "Wanted a world language" de prof. d-ro Mario Pei, kiu aperis en 1969. La tradukinto aldonis tabelon, kiu klare montras la facilecon de Esperanto, kaj li lerte enmetis la adreson de CO de UEA, por ke oni povu peti informojn. La revuo aperas en eldonkvanto de 111 000 ekzempleroj kaj estas legata i.a. de notarioj, advokatoj, impostkonsilistoj, altrangaĵ oficistoj, akademianoj kaj ekslernejoj de altlernejoj.

Estus dezirinde, ke ankaŭ revuoj en aliaj lingvoj sekvus tiun bonan ekzemplon!

Estraranaj interparoloj

Hannover (pp/bc) La 13an de oktobro renkontiĝis la prezidanto de GEA, D-ro W. Bormann, kaj la sekretario de la asocio, Richard Hirsch, kun aliaj estraranoj en Hannover, por preparoli la tagordon kaj la aliajn problemojn de la venonta estrarkunsido, kiu okazos la 4 nov 73 en Lüdenscheid. Ili decidis pri nesolvitaj detaloj de la nova kotizregulo de GEA surbaze de la volo de la membrokunsido en Luksemburgo kaj pri urĝaj aferoj rilate la UEA-membrojn en Germanio. Plej gravaj estis kelkaj preparoj por novaj iniciatoj de GEA, kiuj estos la ĉefaj punktoj de la estrarkunsido. Ni informos pri tiuj punktoj tuj post la GEA-estrarkunsido. Cetere, la kostojn por tiuj renkontiĝoj necesaj por la asocio ĉiu estrarano pagas mem.

Nekrologo en Times

London (pp/ps) La plej prestiĝa ĉiutaga gazeto en Britujo, The Times, presis planan nekrologon pri Nikolaj Rytjkov la 5 sep 1973. Aperis artikolo ankaŭ en Radio Times, la ĉiusemajna gazeto kiu enhavas la radio- kaj televid-programojn de B.B.C.



De la lando de la  
rozoj - al la urbo  
de la rozoj

Zweibrücken (pp) Du bulgaraj esperantistoj, instruisto kaj biokemiisto, estis gastoj de la Esperanto-klubo Zweibrücken. Nia bildo montras ilin kune kun Oliver Walz, la E-aktivulo en tiu urbo.  
El: Pfülzischer  
Merkur, Zweibrücken  
4.10.73

\*\*\*\*\*

Foto: Bayer

## Kion povas fari fakaj asocioj por Esperanto?

Daŭrigo de la preleĝo de Dr. Werner Bormann dum la jarĉefkurveno de AGEI en Bielefeld (Vidu FP n-ro 23/73)

Tion mi jam postulis en mia festpreleĝo "Esperanto en la lernejojn" dum la 42-a Germana Esperanto-Kongreso en Soltau 1964. Sed tio estas nur unu flanko de la medalo, la teorio. Se io serĉas agnoskon, sampeze gravas la praktiko, la apliko de la Internacia Lingvo por iu senca afero. Uzi Esperanton praktike signifas pli facilan elvolviĝon de io utila, kaj utileco alte valoras en nia materialisma tempo.

Jen estas la vasta kampo de la fakaj asocioj en la Esperanto-movado. Tie ili laboradas, kaj el tio konsekvencas ilia kontribuo por nia celo. La demando metita al mi en la temo de mia preleĝo: "Kion povas fari fakaj asocioj por Esperanto"? estas resume respondebla tiel: aktive kaj per tio decide kunhelpi en la breĉobato favore por Esperanto. Per fakaj laboroj ili pruvas, ke Esperanto kapablas servi sur ĝenerale rekonitaj kampoj, kaj ĝi tiel povas enviciĝi inter la socie akceptitaj instrumentoj.

Tiun apogan rolon ludas ambaŭ tipoj de fakaj asocioj. Profesia uzo de Esperanto facile vekas atenton ekster niaj randoj. Esperantistoj formas diversspecajn grupojn de samprofesiuloj. Modelo por unu estas la instruistoj, multaj el ili scipovantaj fremdlingvojn. Ilia esperantigo estas signo de seniluziigo majstri la lingvajn barojn per naciaj lingvoj lernataj kiel fremdlingvoj. La alia ekzemplo estas la fervojistoj, kie multaj homoj, inter ili parto ne lerninta fremdlingvon en la lernejo, havas densajn translimajn kontaktojn. La duan tipon de fakaj asocioj konsistigas la organizaĵoj ne ligitaj al okupo, sed al iu aparta intereso, nomebla "fako". Kelkaj el ili jam faras konsiderindan laboron en sia fako kaj simple per tio por Esperanto. Ankaŭ malamiko de Esperanto ne povas subpremi la valoron de servoj en la aŭtohelpado per nia aŭtoklubo IEKA, pri kiu mi scias kiel ĉia vicprezidanto. Grandan aprezon ankaŭ atingis niaj religiaj asocioj. Ĝus fondita estis mondassocio por turismo, en kiu kampo la plej grandaj praktikaj sukcesoj de Esperanto estas facile imageblaj.

Kiel estrarano de UEA komisiita zorgi pri la fakaj asocioj mi devas fine montri la taskojn de UEA rilate fakajn asociojn. Mia mondorganizaĵo ja havas du bazajn funkciojn: la tegmantan kaj la nemfaran funkcion. Ĝi mem prilaboras la delegitan reton, la kontaktojn al mondorganizaĵoj kiel UN kaj UNESKO, la revuon "esperanto" kaj la Univerŝalajn Kongresojn. Sed kiel ĝenerala centro de la Esperanto-movado ĝi devas doni la gvidlinion por la aganta esperantistaro kaj fiksi la "Esperanto-politikon", t. e. nian vojon por plejeble rapide sukcesigi la Internacian Lingvon. Pro tiu tasko ĝi klopodas kunordigi ankaŭ la laborojn, kiujn la fakaj asocioj entreprenas el siaj fakspertoj, kaj tial mi daŭre serĉas la kontakton kun la fakaj asocioj. La tegmenta funkcio due signifas, ke UEA devas mem aktivi tie, kie rekte koncernataj fortoj ankoraŭ mankas aŭ estas malfortaj. Mi strebas plimalgrandigi tiun parton el mia estrara ofico por veki pli kaj pli da Esperanto-aktivecoj ĉefe en fakaj medioj. (Fino)

\*\*\*\*\*

## Faktoj pri Aŭstralio

Bonn (pp) Nuntempe estas presata en Nürnberg informbroŝuro en Esperanto pri Aŭstralio, eldonata de la aŭstralia registaro. La preciza titolo ne jam estas konata, sed laŭ informo de ambasadoro Ralph Harry la broŝuro baldaŭ estos havebla en ĉiuj diplomataj reprezentantejoj de Aŭstralio. Eldonkvanto estas 10 000 ekzempleroj. Detaloj sekvos!

Esperanto en la radio. Varsovio: La milito en la Proksima Oriento kaj la proceso de la rilatoj inter Pollando kaj FRG, jen temoj el la politika kampo. La E-Ĉiĉepreso raportis pri la vizito de PEA-ĉefdelegacio en Berlino kaj disaŭdigis "Novaĵojn de Pilo-Press".

## Zamenhof-busto baldaŭ en Jugoslavio

Prilep (pp) Laŭ informo ricevita de nia raportanto Marinko Ĉivoje el Zagreb, iniciate de tre aktiva Esperanto-societo "La Progreso" en Prilep, okaze de ĉi-jara Zamenhofa Tago, estos en Prilep starigita Zamenhofa monumento (marmora busto). La busto estos starigita en la centro de la urbo kiu nombras proksimume 50.000 loĝantojn. Ĉi estas la verko de konata makedona akademika skulptisto vivanta en Prilep, Boris Nikolovski. En Jugoslavio ekzistas unu Zamenhof-strato, nome en Zagreb, inaŭgurita en 1953, okaze de la 38a UK de Esperanto, kaj unu Zamenhof-strato en Slavonski Brod.

## Rekorda eldonkvanto

Varsovio (pp/NOZO) En Varsovio aperis nova Esperanto-libro titolita "Rozmówki esperanckie" (Esperanto-koversacioj) de Andrzej Pettyn. Tiun 246paĝan libron poŝformatan aperigis la konata pola eldonejo "Wiedza Powszechna" en la kvanto de 20 000 ekzempleroj. En la libro destinita ĉefe por esperantistaj turistoj troviĝas proksimume 5 000 tipaj frazoj kaj vortoj el la ĉiutaga vivo, aranĝitaj laŭteme. La unuopaj ĉapitroj de la frazaro estas dediĉitaj al valutoj, vojaĝoj, loĝado en hoteloj, manĝoj, servoj, butikumado, vizitado de urboj, poŝto-telefono-telgrafo-servoj, sanprizorgado, distroj, ekonomiaj, sociaj kaj politikaj demandoj, ĉiutagaj parolturnoj. Aparta ĉapitro estas dediĉita al la Esperanto-movado kaj en tiu ĉi ĉapitro oni mencias pri "Heroldo de Esperanto", "Pola Esperantisto" kaj "Pilo-Press"

La frazaro "Rozmówki esperanckie" (Esperanto-konversacioj) estas ĉefe destinita por la personoj ne konantaj Esperanton aŭ por esperantistaj turistoj, kiuj komencis lerni la lingvon. Tamen - pro la laŭtema aranĝo de la ĉiutagaj esprimoj kaj parolturnoj - ĝi povas ankaŭ tre utili al tiuj esperantistoj, ankaŭ alilandaj, ne nur polaj, kiuj jam ellernis la fundamenton de la lingvo, sed deziras nun profundigi sian lingvokonon tutspeciale kun aparta konsidero al la ĉiutaga komuna lingvaĵo.

En la unuopaj ĉapitroj laŭtemaj kaj en la unuopaj subĉapitroj, kiuj estas presitaj paralele en la pola lingvo kaj en E-o, troviĝas listigitaj vortoj kaj vort-grupoj, kiujn oni povas utiligi per substituo. La libron kompletigas sufiĉe ampleksa skizo pri la E-gramatiko kaj ankaŭ aparta ĉapitro dediĉita al la elparolo, akcentado ktp.

Finante oni povas rekomendi ĉi tiun frazaron ne nur al la polaj esperantistoj, sed ankaŭ al la alilandanoj, kiuj volas konatiĝi kun la tipaj ĉiutagaj frazoj proponataj de la homo, kiu dum multaj jaroj profesie kaj hejme uzas Esperanton - redaktoro Andrzej Pettyn el la Esperanto-Redakcio de la Pola Radio, ĉar li estas la aŭtoro de ĉi tiu interesa publikaĵo.

\*\*\*\*\*

## Kio kaj kie?

Esperanto-kursoj, ĉefe en popolaj altlernejoj, okazas en: Nürnberg (15 partoprenantoj junaj), Offenbach (16 p.), Pfaffenhofen, Lüneburg, Minden.

Regionaj kunvenoj okazos en: Nürnberg la 4 nov 1973 (detaloj sekvos) Mainz la 11 nov 1973, je la 10a horo en Gasthaus "Rheinessenhof" Klarastr. 15a Ĉofkunveno de ROMOLO, gastoj bonvenaj! Dum ĉiuj aranĝoj estos librostando!

De la 9 - 14 okt 73 okazis Esperanto -intenskurso en Gronau laŭ la modelo de Bielefeld, Paderborn kaj Siegen.

Esperanto en la radio. Romo ĉifoje estis bonege aldebla. Oni disaŭdiĝis kanton de la pola horo "Ewangelijny Rytm", kiu ankaŭ vastis en Romo. Fekino raportis pri la vizito de la kanada ĉefministro Trudeau en Pekino kaj mekanika industrio. Muzikvorta elsendo pri la ĉina teatro!

Homoj kaj Nomoj

kun kaj sen Renomoj

Hermann Behrmann, Löhne, konata pro Esperanto programita, estis elektita prezidanto de Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI) dum la ĉi-jara kunveno en Bielefeld. Li transprenis tiun funkcion de Helmut Sonnabend, kiu fariĝis prezidanto de IEEI.

Bertil Englund, Malmö, post sia gastludo en Norderney, ludos kiel muzikisto en orkestro ĝis fine de oktobro en la svisa ĉefurbo Bern. Survojaĝe al Bern li telefonis al Pilo-Press el Augsburg.

Peter Schilperoord, Londono, informis, ke oni jam komencis la preparon por produkti longludan diskon kun la plej bonaj eroj el la diversaj recitaloj de la antaŭ nelonge mortinta Nikolaj Rytjkov.

Benata Hengstmengel-Koopmans, juna nederlandino, instruis Esperanton en Jyväskylä, Finnlando, okaze de la tieaj someraj universitataj kursoj. Partoprenis multe da gelernantoj, kiuj fine sukcese faris ekzamen(et)on.

Ralph Harry, aŭstralia ambasadoro en Bonn, estis honora gasto kaj preleganto dum la inaŭguro de intensa Esperanto-kurso en Gronau, FRG, kiu ĵus finiĝis. La urbestro de Gronau, s-ro Jäkel, dum oficiala akcepto akcentis, ke Gronau neniam antaŭe havis tian eminentan gaston kiel ambasadoron, kiu reprezentas kompletan kontinenton. S-ro Haamberg, decernato por kulturaj kaj lernejoj aferoj de Gronau, konstatis similecon inter Gronau kaj Melbourne, almenaŭ laŭ aspekto de supre.

F. Almada, la tradukinto de la libro "Mi estas Pelé", en intervjuo kun A. Pettyn de Pola Radio opinis, ke la ŝancoj por la brazila teamo dum la venontjara futbal-ĉampioneco en FRG ne estas tre grandaj. Mankas la "futbalreĝo".

Evelyn Berndt, prezidantino de la Esperanto-grupo Dresden (GDR), rakontis al la aŭskultantoj de la Pola Radio pri la agado de la Dresdenaj esperantistoj. La 13an de oktobro okazis "Pola tago" kun gastoj el Vroclavo, kiu estas ĝemela urbo de Dresden.

St. Swistak, prezidanto de PEA, kaj A. Pettyn, ĝenerala sekretario, kun alia membro de la ĉefa estraro de PEA estis gastoj de Centra Laborrondo Esperanto de GDR. Ili vizitis Berlin, Dresden kaj Potsdam, kaj interparolis kun la gvidantoj de CLE Rudi Graetz, prezidanto, kaj Detlev Blanke, sekretario, pri subskribota kontrakto per kunlaboro.

\*\*\*\*\*

Radio Bervalio respondas

D: Ĉu la konata fiata kampanjo ne estas danĝera por Esperanto?

R: Tute ne, male! FIAT ne okupas sin pri gramatiko. Aŭtomobiloj povas rapidigi ankaŭ la evoluon de Esperanto.

D: Mi ne komprenas la frazon "La fiasko estis terura." Ĉu vi povas klarigi?

R: Ni povas! "Fiasko" estas germanismo ekestinta el preseraro. La frazo devas teksti: "La fiasko estis terura."

El "Nürnberger Zeitung" 15.9.73

Muzika raporto por junuloj:

Esperanto furoris en Hamburg, ke oni ne forgesis ĝin! Esperanto kiel sakrata konsilo:

Bily Preston, Esperanto,  
Nicky James

Hamburg, 7. September. Im Audimax haben sich die Straßensänger die Musikanten mit dem Volkshedensschlag. Wunderschöne rote Erdbeeren auf dem Plakat sollen zum Konzertbesuch verleiten. Der Saal ist ziemlich umherfüllt. Im Vorprogramm sind die Plakaten nicht angekündigt erschienen die Esperanto- und englisches Rock-Orchester. Im Orchester — es gibt auch elektronische Gegen, die sich hervorragend gut der Rock-Musik anpassen

Einer auf der Bühne sagt im Solozug in diesem Raum seien wohl die Musiker in der Oberzahl. Fast stimmt es. Aber die wenigen, die gekommen sind sind so begeistert von der Gruppe, die sie nie im Leben zuvor gehört haben, daß man den Namen Esperanto zumindest in Hamburg nicht mehr vergißt.

Drei Geheimtipps: Bily Preston, Esperanto, Nicky James.